

Literaturaj perloj, 4-a parto  
*Ebrio* de William Auld  
Claude Gacond, 246-a radioprelego, 1968.06.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni forlasas la spritan gaŭlecan humuron de Raymond Schwartz por alia humuro, tiu de William Auld :

A.- En nia serĉado de literaturaj perloj, kiuj devus esti konataj de ĉiuj esperantistoj, nia rigardo turniĝas aŭtomate al lia poemo **Ebrio**.

Cl.- El tiuj versoj vi eble ne ĉion komprenos, ĉar ĝuste oni ne devas povi ĉion kompreni. Ebrio nebuligas la penson kaj pezigas la langon.

A.- William Auld faras pli ol priskribi animstaton. Li metas nin en trivialan etoson. Kun la drinkanto ni ĝuas pri la ĝojo gluti likvorojn. Kaj poste ni sentas en ni du emojn : kompaton por tiu ebrulo kaj mokon al lia ebrico.

Cl.- Aŭdu tiun poemon **Ebrio** :

la boteloj staras vice,  
kamarade kaj komplICE  
sur la altaj murobretoj –  
botelegoj, boteletoj,  
verdaj, flavaj,  
grasaj, kavaj,  
palpebrume en la lumo  
min invitas al konsumo,  
gluta, tuta,  
ĉes-refuta  
forkonsumo de l' enhavo,  
de la verdo, de la flavo,  
de likvoro glate glita  
svate ŝvita  
kvate kvita  
strate strita  
streta  
struta

mi rimarkas : en angulo  
sidas ia ina ulo  
kiu ridas ĉevaldente  
kaj rikanas sento-tente,  
sin ekmovas,  
kison blovas,  
krurojn ŝovas :  
kaj mi povas  
super ŝtrumpo vidi blankon,  
sangomankan gamboflankon,  
mi vin amas, bela ino,  
mi adoras vin sen limo,  
volas tuŝi,  
kune kuŝi,  
kaj karesi,  
kaj forgesi,

Literaturaj perloj, 4-a parto  
*Ebrio* de William Auld  
Claude Gacond, 246-a radioprelego, 1968.06.26 & 29

pri la griza ver' forgesi  
grila priva vorgeresi  
vira vorga pivaresi  
vipareŝi  
mi neŝeŝi  
neŝeŝi

ŝuvi puvi povi-povaŝ  
diri kie ŝiŝ ŝin trovaŝ  
la ne

la ne-ŝe

ne-ŝeŝ

ŝeŝ

dako danto danko dankon  
dankon

padonu mineŝtaŝ bria  
padon'

padon'

'kon

'kon

paŭzo

naŭzo

A.- Tiun poemon de William Auld, kiu estas titolita **Ebrio**, vi povas relegi en la *Esperanta Antologio* kaj en *La Infana Raso*.

Cl.- Unu el la versoj de *La Infana Raso* diras :

A.- Nuda, senartifika, estas la kanto.

Cl.- Ĉu ne speco de memdifino de la arto de la poeto William Auld ?

A.- Aŭdu alian kanton de William Auld. Sama nigra brita humuro devigos vin komplete kaj moke rigardi al la homa vivo.

Cl.- Tiu poemo titolas **Unu el ni** :

Sidas sub lampo.

Legas librojn.

« Edukiĝas ».

Fariĝas ĉiutage pli ĉifona.

Tri tagojn lasas ŝimi

sian barbon.

Dek jarojn lasas ĝibi

siajn ŝultrojn.

Senzorge lasas kokri lin l'edzino,

Kaj ĉiutage pli malrisortiĝas

Ĝis iam miro estas jam maroto,

Kaj, kvazaŭ nuda mar-molusk' en konko,

Li timas trudi kapon en eksteron.

Kaj tro malfrue

Literaturaj perloj, 4-a parto  
*Ebrio* de William Auld  
Claude Gacond, 246-a radioprelego, 1968.06.26 & 29

Konstatas, ke nenion li plenumis,  
Repensas al iama knab' sincera  
Kies intenco arda ne sufiĉis.

Kaj  
Sidas sub lampo.  
Legas librojn.  
Kadukiĝas.

A.- Tiun duan poemon de William Auld, kiu estas titolita **Unu el ni**, vi ankaŭ povas relegi en la *Esperanta Antologio*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-